# Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj*

*http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k80.html*




# Redaktore

Nova jaro, nova vivo. La lastan numeron de **Kajeroj el la Sudo** ni renoncis printi ĝin, escepte de la ekzempleroj, kiujn anoj mendu surpapere, kaj decidis publikigi ĝin rekte en la reto.

Tio havas kiel direktan sekvon, ke nun eblas publikigi la magazinon iom post iom, laŭ la apero de la artikoloj. Kial atendi al publikiga dato? Plej eble kiel frue estas nun, do mi inaŭguras tiun novan epokon de ekskluzive virtuala publikigado per apero de ĉi tiu artikolo, kaj poste mi aldonos la cetaran parton de la kajero, iom post iom, sen hasto, sed sen paŭzo. Kompreneble, tio kaŭzos neeviteblajn ŝanĝojn en ĉi tiu redaktora enkonduka artikolo. Sed oni baldaŭ alkutimiĝos al tio, mi esperas.



Prus, aŭtoro de **La Faraono**

Ni legos per niaj paĝoj la ceteran parton de La Faraono, de Boleslaŭ Prus, kaj post tio ni komencos publikigi alian literaturan verkon, kiun ni elektos inter la plej belaj paĝoj de nia esperanta literaturo, kvankam ni ne renoncas publikigi fojfoje novajn paĝojn de niaj plej freŝaj artistoj de la plumo. La unua volumo havas 25 ĉapitrojn, la dua havas 24 kaj la tria, 16. En ĉiu volumo la numerado rekomencas je la 1-a ĉapitro, sed ĉi tie ni ne rekomencos, tiel ke la 75 ĉapitroj havos kontinuecon kaj unuecon. Sekve, en la paĝoj de ĉi-tiu numero oni trovas la unuan ĉapitron de la Dua Volumo de la verko de Prus, la 26ª.

Mi atendas viajn novaĵojn kaj komentojn ĉe kajeroj@gmail.com.

Altestime via, Jesuo

# Parolas la Prezidanto

Estimataj gehaleanoj!

Denove mi parolas pri krizo. Kie estas la krizo?



Kiu havas krizon? Kiu suferas la krizon?

Riĉuloj ne havas krizon, ili ne suferas ĝin, kaj fakte ili kreas ĝin. Eĉ Barako Obama diras: la bankoj faras en tiu ĉi momento novan krizon, kiam ili estas malklaraj. Li eĉ sentas sin devigata batali bankojn.

En tiu ĉi momento la laboristoj de la mondo bezonas sindikatojn, fortajn sindikatojn, sed kun malfortaj sindikatoj kiel tiuj, kiujn ni nun havas, venkas, kaj ĉiam venkos, riĉuloj. Iam en Hispanio sindikatoj reprezentis laboristojn, sed post kelkaj strikoj kontraŭ la tiama Prezidento socialisma, Felipe Gonzalez, ties registaro havis la "feliĉan" ideon salajrigi la respondeculojn de la plej fortaj sindikatoj hispanaj, kaj ekde tiam ili ne plu kontraŭstaras surstrate aŭ en aliaj publikaj forumoj, la kontraŭlaborismajn agojn (ofte fiaj) de la registaro.

Aliflanke, en Hispanio renaskas faŝismo, ĉar estro de urbodomo ne akceptas registri inmigrantojn. Jen ksenofobio. La kialo argumentata estas, ke pro registro ili gajnas rajtojn kaj servojn de la socio. Sed registro ĉe urbo ne estas rajto, sed devo, kaj sekve oni ne povas nei tion al eksterlandano. Problemo venas el tio, ke multaj hispanoj apogas tiun sensencaĵon.

Tia evento jam okazis en Eŭropo, kiam Le Pen preskaŭ iĝis Prezidanto de unu el la plej gravaj landoj de nia kontinento, la Respubliko Franca.

Fine, mi dezirus notigi, ke "Kajeroj el la Sudo" ŝanĝiĝas, kvankam oni povas daŭre legi ĝin per interreto senpage. Tio signifas, ke ĝi ankoraŭ havas la esperantan spiriton.

Kamaradece,

**Johano Antono,**

**Prezidanto de HALE**

# ¡Viva la República!

(ke vivu la respubliko)

Antaŭ nelonge mi parolis pri la nuna hispana politiko kun kolegino, kaj subite, ŝi abrupte finis dirante "Vivu la Respubliko!"



Jen la flago de la Unua Hispana Respubliko

Kaj tio pensigis min pri la malprofunda, ne diri banala aŭ folklora ideo, kiun komuna hispano hodiaŭa havas pri respubliko kaj Hispanio. Ni vidu:

La unua respubliko venis la 11an de Februaro de 1973, laŭ tiama parlamentano Emiljo Kastelar-, ""portita de neniu, sed cirkonstancoj" (morto de reĝo Fernando 7a, fuĝo de reĝino Isabel' 2a, rezigno de reĝo Amadeo de Saboja). Bedaŭrinde tiu projekto elĉerpiĝis la 29an de decembro 1974, pro militoj kaj sociala malpaco, kiuj prezentis problemojn, kiujn tiu respubliko ne solvis pro manko da volo aŭ preparo, dum la registaro kaj parlamento diskutis pri federacieco aŭ centrismo de la lando. La Dua Respubliko, tamen, ne venis tiom pace kiel la Unua, ĉar sia "laŭleĝeco" estis vera fraŭdo, kiel ni jam diris en tiuj ĉi paĝoj[1]: la reĝo nek fuĝis nek mortis nek rezignis, sed oni minacis lin, ke se li ne forlasas la landon nun, oni ne respondecas pri Lia vivo kaj tiuj de liaj familianoj". Poste, la respubliko ne garantiis vivon kaj posedaĵojn de ĉiuj hispanoj egale, ĉar, interalie, en vortoj de unu el siaj prezidentoj, S-ro Manuel Azaña, "La respubliko estas por ĉiuj, sed devas esti regata nur de respublikanoj", kaj ¨ĉiuj bruligantaj preĝejoj de Madrido ne egalvaloras la vivon de unu sola vera respublikano", kio signifis oficialan rajtigon de malapero de rajtoj pri egaleco kaj libereco pri penso. Jen la kerno de intercivitana milito, kiu subpremigis Hispanion en la ombron de kvar dek jaraĝa diktatoreco.

Monarĥio estas ideo esence maljusta kaj kontraŭdemokratia, mi konsentas. Tamen..., ĝis nun hispanoj ne sukcesis konstrui veran demokration ĉu respublikan, ĉu monarĥan, ĉu alispecan. Oni esperu, ke iam la nuna sistemo evoluos en veran demokration. Ĝis

[1] KelS nº 74ª, paĝo 6ª, ¨Ni bruligu la flagon de la Dua Respubliko!"



Manuel Azaña


nun hispanaj politikistoj volis konstrui respublikon pere de revolucio, kaj pro tio la eksperimento ĉiam fiaskis. Plej bone estas lasi la sistemon disvolviĝi, kaj doni al ĉiu individua persono de Hispanio la rajtojn, kiuj estas liaj aŭ ŝiaj denaske, laŭ la intencdeklaracio de Unuiĝintaj Nacioj de 1948, kiun Hispanio ankaŭ subskribis. Estus bone, ke krom la registaro, ankaŭ ĉiu hispano subskribu ĝin, tolerante, ke aliaj opiniu diverse al si, kaj ne pro tio bati aŭ fifamiligi lin aŭ ŝin. Kaj partioj politikaj redonu al popolo suverenecon, ĉesonte de tiam la klaŭna spektaklo pri aliĝoj kaj malaliĝoj inter politikaj partioj, kiuj tute ne favoras la popolon. Tiel, kiam la aro da hispanoj decidu la politikon de sia lando, kaj ne la estroj de la koncernaj politikaj partioj, kiam tio okazos en etoso tolerema kaj komuna, kiam ni ĉiuj sentas, ke temas pri "tio nia", kaj ne "nia sed ne via", estos grundo favora por ke tiu rara floro en Hispanio, demokratio, kreskos, naskante respublikon kiu, laŭ sia propra nomo, estu la afero de ĉiuj. Tiutempe estos facile danki al la Reĝo pro la ofico kaj servo plenumitaj kaj maldungi lin kaj familion, kaj elekti Prezidenton de Respubliko, kiu reprezentos nin ĉiujn egale, kaj ne kelkajn pli ol aliajn, kiel okazis en la du fuŝitaj respublikaj eksperimentoj. Tamen..., ĉu indas tiu destino la vojaĝon?

De unu flanko oni diras, ke Prezidento estas malpli kosta ol Reĝo, ĉar tiu-ĉi kunportas reĝan familion kaj kortumon, sed de alia flanko oni diras, ke reĝa familio estas institucio, kiu unuigas la nacion al sia historio, jarcentojn malantaŭen, kaj tio estas bona por la kulturo de la lando. Kaj, fronte al tio estas la fakto, ke Prezidento faras la samajn aferojn kiel Reĝo, tamen mankante al li eksperto kaj konsilo de patro, edukado por la rolo prezenti la landon, kaj la aliaj avantaĝoj de profesiulo fronte al amatoro.

Tamen, iam hispanoj voĉdonos, ĉu ili volas reĝon, ĉu respublikon. Sed tiu balotado ne eblas dum amaskomunikiloj estos kaptitaj de malmulte da manoj, ĉiuj tinkturitaj de politikaj sintenoj ne necese je la intereso de la popolo.

Respublike via,

**Jesuo**



Reĝo Juan Carlos I

# Vojaĝo interuptita,

## de Jack Crane

Subite mi vidis ĉion nigra, kaj multaj steletoj turnis antaŭ mi. Mi aŭdis pulsantan, akutan bruon, kaj la steletoj malproksimiĝis el mi, lasante nigran bordon, kiu dikiĝis pli kaj pli. Mi ŝajnis esti sur la planko de puto kies buŝo malproksimiĝis for kaj for. Tial mi premis la butonon kelkajn fojojn. Ĝis stevardino venis.

–Oksigeno, bonvolu–, jen mia peto.

–Kio?–, diris ŝi, nekredante.

–Mi mortas, donu al mi oksigenon, bonvolu...

Ekkuris la kompatinda stevardino laŭ la tuta kuridoro, kaj venis kun sia estrino, egipta diino, kiu ŝajnis eskapita el piramido.

–Kio okazas, sinjoro?–, demandis ŝi per perfekta angla.

–I cannot breath, (mi ne povas respiri)–, mi diris, –mi bezonas oksigenon.

—Ni ne havas, sed mi povas helpi vin, sinjoro.



Kaj ŝi forpuŝis la ceterajn pasaĝerojn el nia sidvico kaj kuŝigis min tie de kapo al piedoj sur la malplenaj lokoj, kaj petis alian pasaĝerinon, belulinon de la Centra Tabulo, teni miajn piedojn per siaj ŝultroj.

—Venu Patricia!—, mi petis.

Kaj mi kredis, ke mi falis en la puton, ĉar mi fermis miajn okulojn dum la zumado kreskis en miaj oreloj, tiel, ke mi ne plu aŭdis la bruon de la aviadilo.

—Kio okazas al vi?—, diris post mallonga tempo Patricia.

—Mi ne povas respiri, mankas al mi aero.

—Ne zorgu, trankviliĝu kaj prenu aeron. Kion pli okazas al vi?




—Donu manon kaj premu forte—, ŝi diris. Mi tiel faris.

—Nun la alian—. Mi denove obeis. Kaj aldonis:

—Buff!, mi kredis, ke mi foriris.

—Ĉu vi foriris? Kien?

—Al "la alia kvartalo"—, mi diris kun ankoraŭ fermitaj okuloj.

Mi notis freŝaeron: Patricia energie manipulaciis ventumilon sur miaj vangoj.

—Okazas, ke mi havas la Faktoron 5an de Lejden, kaj mi ne povas stari tiom longe.

—Ne zorgu, trankviliĝu.

Mi fermis miajn okulojn, kaj duonmalfermigis ilin kiam Patricia, kiu estas doktorino, diris ion:

—Ĉu oni malpermesis al vi Aspirinon absolute?

—Ne.

—Bone. Rigardu: mi donas al vi aspirinon. Englutu ĝin.

Baldaŭ post kiam mi englutis la pilolon, la steletoj komencis malkreskiĝi, kaj la zumado ĉesis pulsi, restante sinsekva zumado. Mi jam povis respiri pli bone.

Mi malfermis miajn okulojn kaj mi vidis ilin du: blondan anĝelon ventumante min, kaj brunan anĝelon tenante miajn piedojn.

Mi aŭdis ŝian ridadon.

—Ha! Sed ne, vi ne plu foriras: via flugo estas ĵus nuligita.

Kaj tie mi vidis min preskaŭ irinta al la alia mondo, en flugo interuptita je dek mil metroj da alteco de du anĝeloj, unu blonda, kaj la alia bruna, tenante min unu per miaj manoj, la alia per miaj piedoj; konvinkante min pri tio, ke mi ne plu iras. Ankoraŭ ne.

Kelkajn minutojn poste mi povis reiri en mian sidlokon kaj miaj kunsidlokanoj povis rehavi siajn.

Ni atingis senevente Kairon, landon da Faraonoj, kiun mi preskaŭ ne vidontis. Sed tiu estu alia rakonto.

Kairo, la kvinan de Januaro

de 2009 (10:45)

**Jack Crane**

# Poema angulo

## Trajn' al vi

Arda nokto en la trajno,
rigardas mi en malhel´,
vojo longa pasas pigre,
venas urbo post urbet´.
En fenestro sen la lumo
kiel filmo kuras bildoj,
montras al mi pasintec´,
kiam ni komune estis,
la animo kun anim´.
Poste venis adiaŭo,
por longa temp´ disiĝis ni.
Post la jaro sen proksimec´
sur la kajo staras vi,
atendante trajnon pigran
kaj en ĝi mian kor´.

## Ĉarmiga Sud´

Maro plaŭdetas ĝis trans horizont,
sablo susuras sub mia pied´.
Venteto taŭzas miajn harojn
kaj suno karesas mian anim´.
En la mano arda vino,
sur la tablo brila manĝaĵ´.
En oreloj dolĉa muzik´,
en la gamboj senĉesa dancad´.
Ekstere regas frosto kruela,
en mia koro varmega memor´,
al ĉarmiga fora Sud´,
patroland de sun´!

B. Piruja

## Amkonfeso

Mia la plej kara,
tiom dolĉa, delikata,
al mi ĉiam proksima,
ĉiam plaĉa, ĉiam alloga
estas vi por mi.
Neniam sen vi mi volas esti,
neniam mi malfidelos,
neniam forlasos mi vin,
mia la plej dolĉa,
la plej ŝatata
fajna ĉokolad´.

# Protektu senkulpulojn

De kelkaj jaroj oni povas vidi televidan filmoserion, Dexter, kiu ĝuas favoron de granda parto de publiko. Tio estas tre pensiga, se ni konsideras pri kio temas tiu serio: serimurdisto, kiu murdas nur geserimurdistojn.

Kiam la heroo estis kvarjaraĝa, oni murdis sian patrinon per distranĉo de ŝia tuta korpo en lia presenco. Dum li kreskis, li disvolviĝis emon mortigi bestojn, kaj ne homojn, ĉar li timis esti kaptita. Sed lia adoptanta patro, Harry, kreis por li kodon, kiu permesis al li vivi sen normalaj sentoj en mondo, kie sentoj estas gravaj por homoj.

La serio sekvis la rakonton de la libro **Darkly Dreaming Dexter** (Dekster, kiu sonĝas ombre), verkita de Jeff Lindsay je 2004, dum la unua sezono. Sed nun estas kvar sezonoj pli.


Tiu sukceso rimarkigas, ke homoj ne estas tiom multe kontraŭ mortopuno kiel oni kutime diras ĉe amikaj rendevuoj kaj eĉ enketoj oficialaj, ĉar baze, Dekster estas la mortopunisto, kiu agas nur kiam ordinara justico fiaskas. Laŭ




la kodo de Dekster, oni povas "ekzekuti" murdiston nur se li aŭ ŝi vere kulpas pri murdo. Se estas dubo pri kulpeco, Dekster ne povas agi. Se tute ne estas, Dekster ja povas, eĉ devas, agi.

Fakte, tio, kion Dekster faras, estas apliki mortopunon al vera murdisto, kaj tio ĝuas favoron de publiko en lando, kie oni publike fieras, ke ne plu estas mortopuno, kaj neniu kuraĝas opinii kontraŭe publike, sen esti sociale apartigita aŭ akre kritikata pro tio. Unuvorte: ne plu ekzistas libereco pri esprimo de propraj opinioj, sed nur pri konformiĝo al la reganta opinio. Sed se tiu "personaj" opinioj estus

sinceraj, homoj kritikus akre tiun serion, kaj Dekster estus la



malplej vidata serio de hispana televido. Pro tio, ke oni estas kontraŭ mortopuno kaj justico per propra mano. Sed ŝajnas, ke tio ne estas tiel.

La supra mapo indikas, ke ankoraŭ estas 58 landoj, kie mortopuno estas laŭleĝa. Oni notigas, ke nur Usono, Singapuro kaj Japanio estas la solaj "civilizitaj landoj", kie mortopuno estas laŭleĝa. Tamen, ni vidu kio estas civilizita lando... Ĉu estas civiliza, ke leĝobservanta homo povas esti mortigita arbitre de krimulo, kiu jam krimiĝis antaŭe, kiu estis en karcero pro tio, ke li murdis, kaj kiun oni elkarcerigis pro tio, ke oni deziras "reinsertigi" lin en socion? Se la krimulo denove murdas, kian respondecon oni postulos el tiuj juĝistoj, psikologiistoj, gvardistoj kaj tiel plu aliaj personoj, kiuj devis reporti kaj subskribi deklaron, ke la karcerulo ne plu estas danĝero por aliaj personoj? Ĉu vere tiuj subskribantoj pagos pro sia eraro, aŭ nur pagos senkulpulo, kiu estis je la atingo de la krimulo en malbona momento? Kiom da vivoj de senkulpuloj indas la tiel nomita "reinsertigo"? Kiom da senkulpaj vivoj valoras la vivo de ununura murdisto? Kaj fine: kiom da murdistoj sukcesis reinsertiĝi? Mi dankus oficialajn statistikojn, bonvolu. Ankaŭ tiu statistiko pri kiom da respondeculoj pri elkarcerigo de murdontuloj pagis pro sia eraro.

Ne, leganto, abolicio de mortopuno ne estas demokratia, sed kontraŭdemokratia, ĉar sekvo estas, ke pagas multaj pro la eraro de malmultaj. La bono de unu kontraŭ la bono de kelkaj. Tio ne estas demokratia. Se murdi estus bona, ĝi estus aristokratia, sed estante malbona, tio estas **kakokratia**. Mortigi estas evitenda. Kiam ĉio alia malsukcesas, oni forprenu murdistojn de socio.



# La Faraono

## Dua Libro

## Ĉapitro 26ª

Ne malproksime de la urbo Pi-Bast estis la templo de l' diino Hator.

En la monato Paoni (marto, aprilo), en la tago de la somera tagnoktegaleco, ĉirkaŭ la naŭa horo vespere, kiam la stelo Sirius estis subironta, antaŭ la pordego de l' templo haltis du vojaĝantaj pastroj kaj unu pentfaranto. Li iris nudpieda, havis cindron sur la kapo kaj estis kovrita per dika ĉifona tuko, sub kiu oni ne povis vidi lian vizaĝon. Malgraŭ la luma nokto oni ne povis distingi la fizionomiojn de la vojaĝantoj. Ili staris en la ombro de du statuoj de la diino kun bovina kapo, kiuj gardis la eniron de la templo kaj favore forigis de la nomeso Habu la peston, pereigan superakvon kaj sudajn ventojn.




Iom ripozinte, la pentanto falis sur la bruston kaj longe preĝis. Poste li leviĝis, prenis la kupran martelon kaj ekfrapis. La potenca metala sono trakuris la kortojn, resaltis de la dikaj muroj de l' templo kaj forflugis super la tritikajn kampojn, super la argilajn domojn de l' vilaĝanoj, super la arĝentajn akvojn de Nilo, kie la vekitaj birdoj respondis al ĝi per malforta ekkrio.

Post longa momento, post la pordego eksonis murmuro kaj demando:

–Kiu nin vekas?

–Dia sklavo, Ramzes–, respondis la pentofaranto.

–Por kio vi venis?

–Por la lumo de la saĝo.

–Kiajn rajtojn vi havas?

–Mi ricevis la unuan pastran benon kaj dum la grandaj procesioj en la interno de l' temploj mi portas la torĉon.

La pordego larĝe malfermiĝis. En ĝi staris pastro en blanka vesto kaj etendinte la manon diris malrapide kaj klare:

–Eniru. Kiam vi trapasos la sojlon, nia trankvilo ekloĝu en via animo kaj plenumiĝu viaj deziroj, por kiuj en humila preĝo vi petegas la diojn.

Kiam la pentofaranto falis al liaj piedoj, la pastro, farante iajn signojn super lia kapo, murmuretis:

–En la nomo de tiu, kiu estas, estis kaj estos... Kiu ĉion kreis... Kies spiro estas la eterna vivo kaj plenigas la mondon videblan kaj nevideblan...

Kaj kiam la pordo fermiĝis, la pastro prenis Ramzeson je la mano. En la krepusko, inter grandegaj kolonoj de la vestiblo, li kondukis lin al la destinita por li ĉambro. Tio estis malgranda ĉelo, lumigata per peĉa torĉo. Sur la ŝtona planko kuŝis fasko de seka herbo, en angulo staris kruĉo kun akvo kaj apude hordea pano.

–Mi vidas, ke ĉi tie mi efektive ripozos post la festenoj ĉe la nomarĥoj!–, ekkriis gaje Ramzes.

–Pensu pri la eterneco!–, diris la pastro kaj foriris.

La respondo malagrable tuŝis la princon. Kvankam li estis malsata, li ne manĝis la panon, ne trinkis la akvon. Li sidiĝis sur la herbo, kaj rigardante siajn piedojn, vunditajn en la vojaĝo, li demandis: por kio li venis ĉi tien?... kial li propravole forlasis sian altan postenon?...

Vidante la murojn de la ĉelo kaj ĝian malriĉecon, Ramzes rememoris la infanajn jarojn, pasigitajn en la pastra lernejo. Kiom da bastonaj batoj li ricevis tie! kiom da noktoj li pasigis por puno sur la ŝtona planko! Ramzes ankaŭ nun sentis tiun malamon kaj timon, kiun inspiris al li iam la severaj pastroj, kiuj respondis ĉiujn liajn petojn kaj demandojn per la sama frazo: "Pensu pri la eterneco!" Post kelkmonata brua vivo fali en tian silenton, ŝanĝi la princan kortegon je mallumo kaj izoleco, kaj anstataŭ festenoj, virinoj kaj

*muziko senti ĉirkaŭ si kaj super si la pezon de la muroj...*

*–Mi freneziĝis! mi freneziĝis!–, diris al si Ramzes.*

*Estis unu momento, kiam li volis tuj forlasi la templon; sed poste li ekpensis, ke eble oni ne malfermos al li la pordon. La vido de la malpuraj piedoj, de la cindro, kiu falis el liaj haroj, la vulgareco de la ĉifona vesto, ĉio ĉi estis por li abomena! Se li almenaŭ havus sian glavon! Sed en ĉi tiu loko kaj en ĉi tiu vesto ĉu li kuraĝus uzi ĝin?*

*Li eksentis nevenkeblan timon, kaj tio rekonsciigis lin. Li rememoris, ke la dioj en la temploj sendas al la homoj timon, kaj ke ĝi estas la unua ŝtupo al la saĝo.*

*–Mi ja estas la vic-reĝo kaj kronprinco–, pensis li–, kion oni povas fari al mi ĉi tie?...*

*Li leviĝis kaj eliris el sia ĉelo. Li estis en granda korto, ĉirkaŭita de kolonoj. La steloj hele lumis, li do rimarkis en unu fino de la korto grandegajn pilonojn, en la alia malfermitan eniron en la templon.*

*Li iris tien. Ĉe la pordo regis mallumo, kaj je malproksime brulis kelke da lampoj, kvazaŭ flugantaj en la aero. Post momento li ekvidis inter la eniro kaj la lumoj tutan densan arbaron de dikaj kolonoj, kies suproj disfluis en la mallumo. Pli profunde, eble kelkcenton da paŝoj de li, oni povis vidi malklare la grandegajn piedojn de la sidanta diino kaj ŝiajn manojn apogitajn sur la genuoj, de kiuj malforte rebrilis la lumo de la lampoj.*

Soldato asirio

*Subite li ekaŭdis murmureton. De malproksime, de flanka navo eliris vico de malgrandaj blankaj figuroj, irantaj en paroj. Tio estis nokta procesio de pastroj, kiuj honoris la statuon de la diino, kantante en du ĥoroj.*

*Ĥoro I. –Mi estas Tiu, kiu kreis la ĉielon kaj teron kaj faris ĉiujn estaĵojn sur ĝi.*

*Ĥoro II. –Mi estas Tiu, kiu faris la akvojn kaj dronigis la tutan teron; Tiu, kiu estas la patro de ĉiuj estaĵoj.*

*Ĥoro I. –Mi estas Tiu, kiu kreis la ĉielon kaj la misterajn horizontojn kaj metis en ilin la animojn de la dioj.*

*Ĥoro II. –Kiam mi malfermas la okulojn, fariĝas la lumo, kaj kiam*

mi fermas ilin, falas la nokto.

Ĥoro I. –La akvoj de Nilo fluas, kiam mi ordonas.

Ĥoro II. –Sed la dioj ne konas mian nomon. [Aŭtentika]

La voĉoj en la komenco malklaraj, fariĝis pli kaj pli fortaj, kaj oni povis jam aŭdi ĉiun vorton. Kiam la procesio malaperis, ili komencis perdiĝi inter la kolonoj... Fine ili eksilentis.

–Tamen ĉi tiuj homoj–, pensis Ramzes–, ne sole manĝas, trinkas kaj kolektas riĉaĵojn... Ili efektive plenumas siajn devojn, eĉ nokte... Sed, ĉu tio utilos la statuon?...

La princo ofte vidis, kiel la loĝantoj de fremda nomeso ĵetis koton sur la statuojn de l' dioj de la limoj, kaj kiel la soldatoj de eksterlandaj regimentoj pafis en ilin el arkoj aŭ ŝtonĵetiloj. Se tio ne ofendas la diojn, kredeble indiferentaj estas por ili la preĝoj kaj procesioj.

–Cetere, kiu vidis la diojn ?...–, diris al si la princo.

La kolosa grandeco de la templo, ĝiaj sennombraj kolonoj, lumoj brulantaj antaŭ la statuo, ĉio ĉi altiris Ramzeson. Li volis ekkoni pli detale la misteran templon kaj iris antaŭen.

Subite, ŝajnis al li, ke iu mano tuŝetis de poste lian kapon... Li turnis sin... Estis neniu, li do iris antaŭen.

Nun du manoj kaptis lin je la kapo, kaj tria, granda apogis sin sur lia dorso...–, Kiu estas ĉi tie?...–, ekkriis la princo kaj ĵetis sin inter la kolonojn.

Sed li faletis: io kaptis lin je la kruroj.

Ree ekregis lin timo, pli granda ol en la ĉelo. Senpense li komencis forkuri, tuŝegante la kolonojn, kiuj ŝajnis bari al li la vojon, kaj la mallumo ĉirkaŭis lin de ĉiuj flankoj.

–Ho sankta diino, savu!–, murmuretis li.

En la sama momento li haltis: kelke da paŝoj de li estis la granda pordego de la templo, tra kiu rigardis internen la stelplena ĉielo. Li turnis la kapon: inter la arbaro de la grandegaj kolonoj brulis la lampoj, kaj ilia lumo malforte rebrilis de la bronzaj genuoj de l' sankta Hator.

La princo revenis en sian ĉelon, ekscitita kaj humiligita; la koro saltis en li, kiel birdo en kaptilo. Unuan fojon de multe da jaroj li falis sur la vizaĝon kaj varmege preĝis, petante kompaton kaj pardonon.

–Via peto estos plenumita–, eksonis super li dolĉa voĉo. Ramzes tuj levis la kapon, sed en la ĉelo estis neniu: la pordo estis fermita, la muroj dikaj. Li do preĝis ankoraŭ pli varmege kaj tiel ekdormis, kun la vizaĝo sur la ŝtonoj kaj kun disetenditaj manoj.

Kiam li vekiĝis en la sekvinta mateno, li jam estis alia homo: li ekkonis la forton de la dioj kaj ricevis promeson de ilia favoro.

De tiu tago, dum longa serio da tagoj kun fervoro kaj kredo li dediĉis sin al piaj servoj. En sia ĉelo li pasigis longajn horojn preĝante, lasis razi sian kapon, surmetis pastrajn vestojn kaj kvar fojojn ĉiutage partoprenis en la ĥoro de la malsuperaj pastroj.

Lia antaŭa vivo, plena de ĝuoj, fariĝis abomena por li, la manko de kredo, kiun li imitis de la malĉastaj junuloj kaj eksterlanduloj, plenigis lin per timo. Kaj se hodiaŭ oni proponus al li elekti: la tronon aŭ la pastran oficon? – li ŝanceliĝus.

Foje la granda profeto de la templo alvokis lin, rememorigante, ke li venis tien ne sole por preĝi, sed ankaŭ por ekkoni la saĝon. Li laŭdis lian pian vivon, diris, ke li jam estas purigita, kaj ordonis al li ekkoni la lernejojn, kiuj estis ĉe la templo.

Pro obeemo, ne pro scivolo, la princo rekte de li iris en la eksteran korton, kie estis la klaso de la legado kaj skribado.

Tio estis granda ĉambrego, lumigata tra truo en la tegmento. Sur matoj sidis kelkdeko da nudaj lernantoj kun vaksitaj tabuletoj en la manoj. Unu muro estis el alabastro, antaŭ ĝi staris la instruisto kaj skribis signojn per diverskoloraj krajonoj.

Kiam la princo eniris, la lernantoj (kiuj preskaŭ ĉiuj estis liaj samaĝuloj) falis sur la vizaĝon. La instruisto, salutinte la veninton, interrompis sian okupon kaj diris al la knaboj lecionon pri la granda graveco de la scienco.

–Miaj karaj!–, diris li–, la homo, kiu ne havas koron por la saĝo, devas sin okupi per la mana laboro kaj laciĝi la okulojn. Sed tiu, kiu komprenas la valoron de la sciencoj kaj studas ilin, povas ricevi ĉiujn povojn, ĉiujn kortegajn oficojn. Memoru pri tio. [Aŭtentika]

"Rigardu la mizeran vivon de la homoj, kiuj ne konas la skribarton. La forĝisto estas nigra, malpura, havas fingrojn kovritajn de kaloj, laboras tage kaj nokte. La ŝtonisto rompas al si la brakon por pleniĝi la ventron. La masonisto, konstruante kapitelojn en la formo de lotuso, estas ofte forblovata de la vento de la supro de l' tegmento. La teksisto havas kriplajn genuojn, la fabrikanto de pafiloj senĉese vojaĝas: apenaŭ li revenis vespere en sian domon, li jam devas ĝin forlasi. La kolorigisto havas fingrojn, kiuj malbonodoras, kaj li pasigas la tempon tranĉante ĉifonojn. Kaj la kuristo, li devas adiaŭante la familion skribi testamenton, ĉar ĉiam minacas lin la danĝero renkonti sovaĝajn bestojn aŭ Azianojn.

Mi montris al vi la sorton de diversaj metioj, ĉar mi volas, ke vi amu la skribarton, kiu estas via patrino, kaj nun mi prezentos al vi ĝiajn belaĵojn. Ĝi ne estas vanta vorto sur ĉi tiu tero, ĝi estas pli grava ol ĉiuj aliaj okupoj. Tiu, kiu profitas la skribarton, estas estimata jam de la infaneco; li plenumas grandajn misiojn. Sed tiu, kiu ne partoprenas en ĝi, vivas en mizero.

La lernejaj studoj estas pezaj kiel la montoj, sed unu ilia tago sufiĉos al vi por la tuta eterneco. Rapide do, plej ragide koniĝu kun ili kaj ekamu ilin... La stato de la skribisto estas princa stato, lia inkujo kaj libro donas al li plezurojn kaj riĉaĵojn!"

Post la pompa parolado pri la graveco de l' sciencoj (la samon aŭskultis la egiptaj lernantoj jam de tri jarmiloj), la instruisto prenis krajonon kaj sur la alabastra muro komencis skribi la alfabeton. Ĉiun literon esprimis kelke da hieroglifaj simboloj aŭ demotikaj signoj. La desegnaĵo de okulo, birdo aŭ folio signifis: A, ŝafino aŭ florvazo: B, homo

staranta en ŝipeto: K, serpento: R, homo sidanta aŭ stelo: S. La multeco de signoj, esprimantaj ĉiun literon, faris, ke la lernado de la arto skribi kaj legi estis tre malfacila kaj laciga okupo.

Ramzeson lacigis la sola aŭskultado, dum kiu la sola distraĵo estis, kiam la instruisto ordonis al iu lernanto desegni aŭ nomi literon kaj batis lin per bastono, se li eraris.



La princo adiaŭis la klason kaj el la lernejo de skribistoj transiris en la lernejon de termezuristoj. Tie oni ins-truis la junulojn fari planojn de l' kampoj, kiuj estis plejparte ortangulaj, kaj niveli kun helpo de du tabuletoj kaj ortangulilo. En la sama klaso oni instruis la arton skribi la nombrojn, same malsimplan, kiel la hieroglifoj kaj demotikaj signoj. Sed la plej simplaj aritmetikaj operacioj apartenis jam al la supera kurso kaj estis plenumataj per globetoj.

Ramzes jam havis sufiĉe kaj ne pli frue ol post kelke da tagoj konsentis viziti la medicinan lernejon.

Tio estis samtempe hospitalo, aŭ pli ĝuste granda ĝardeno, plena de arboj kaj bonodoraj herboj. La malsanuloj pasigis la tutajn tagojn en libera aero kaj suno, sur litoj, kiuj anstataŭ matracoj havis streĉitan tolon.

Kiam la princo eniris, regis tie plej granda agado. Kelkaj malsanuloj banis sin en fluanta akvo, aliajn oni ŝmiris per bonodoraj pomadoj aŭ incensis. Estis kelkaj, kiujn oni dormigis per la rigardado aŭ mana karesado; unu ĝemis, al kiu oni ĵus remetis elartikigitan piedon.

Pastro donis en pokalo miksturon al grave mallsana virino, dirante:

–Venu kuracilo, venu, elpelu tion el mia koro, el miaj membroj, sorĉa kuracilo. [Aŭtentika]

Poste la princo, akompanata de la ĉefa kuracisto, iris en la apotekon, kie unu el la pastroj preparis rimedojn el herboj, mielo, oleo, serpentaj kaj lacertaj haŭtoj, ostoj kaj grasoj bestaj. Deman-

dita de Ramzes, la farmaciisto ne levis la okulojn de sia laboro. Li senĉese pesis kaj pistis, murmuretante preĝon:

–Ĉi tio resanigis Izidon, resanigis Izidon, resanigis Horuson... Ho Izido, granda sorĉanto, resanigu min, liberigu min de ĉiuj malbonaj, malutilaj, ruĝaj aferoj, de la febro de l' dio kaj de la febro de l' diino... Ho Ŝanagat Eena-gate Synie! Erukate! Kauar-uŝagate! Paparuka paparaka paparura...

–Kion li diras?–, demandis la princo.

–Mistero...–, respondis la granda kuracisto, metante la fingrojn sur la lipojn.

Kiam ili eliris en la malplenan korton, Ramzes diris al la granda kuracisto:

–Diru al mi, sankta patro, kio estas la kuracista arto kaj sur kio estas bazitaj ĝiaj rimedoj? Ĉar mi aŭdis, ke la malsano estas malbona spirito, kiu eklogas en la homo kaj malsata turmentas lin, ĝis ĝi ricevos konvenan nutraĵon. Oni diras, ke unu spirito sin nutras per mielo, alia per oleo, alia per bestaj ekskrementoj. La kuracisto devas do antaŭe scii: kiu spirito loĝas en la malsanulo; kaj poste, kiajn nutraĵojn ĝi bezonas por ne turmenti la homon?...

La pastro pensis momenton kaj respondis:

–Kio estas la malsano kaj kiel ĝi falas sur la homan korpon, tion mi ne povas diri al vi, Ramzes. Sed mi klarigos al vi, ĉar vi estas purigita, kio gvidas nin en la kuracado. Imagu, ke iu estas malsana je la hepato. Ni, pastroj, scias, ke la hepato estas sub la influo de la planedo Peneter-Deva, [Venus] kaj ke la kuracado devas dependi de ĉi tiu stelo.

Sed ĉi tie la scienculoj sin dividas en du skolojn. Unuj diras, ke al malsana je la hepato oni devas doni ĉion, kio estas sub la influo de Peneter-Deva: la kupron, lapis-lazuri, florajn dekoktojn, antaŭ ĉio verbenajn kaj valerianajn, fine diversajn partojn de la korpo de l' turto kaj kapro. Aliaj kuracistoj opinias, ke kiam la hepato estas malsana, oni devas ĝin kuraci per ĝuste kontraŭaj rimedoj. Kaj ĉar la kontraŭulo de Peneter-Deva estas Sebeg [Merkuro], do la kuraciloj estas: la viva arĝento,

smeraldo kaj agato, nuksoj kaj fine pistitaj partoj de la korpo de l' rano kaj strigo.

Sed tio ne estas ankoraŭ ĉio. Oni devas atenti la monaton, tagon kaj horon, ĉar ĉio ĉi estas sub influo de stelo, kiu povas helpi aŭ malfortigi la efikon de la rimedo. Fine oni ne devas forgesi: kiu stelo kaj kiu signo de la Zodiako estras la malsanulon? Nur konsiderinte ĉion ĉi, la kuracisto povas elekti certan rimedon.

—Kaj ĉu vi resanigas ĉiujn malsanulojn en la templo?

La pastro skuis la kapon.

—Ne—, respondis li.— La homa inteligento, kiu devas atenti tiom da detaloj, pri kiuj mi parolis, tre facile eraras. Ankoraŭ pli bedaŭrinde estas, ke enviemaj spiritoj, protektantaj aliajn templojn, ofte por savi sian famon malhelpas la kuraciston kaj detruas la efikon de la rimedoj. Do plej diversa povas esti la definitiva rezultato: unu malsanulo tute resaniĝas, la stato de alia nur iom pliboniĝas, tria restas sen ŝanĝo. Kelkaj fariĝas ankoraŭ pli malsanaj, eĉ mortas... La volo de l' dioj!



Egipta kuracisto.

La princo atente aŭskultis, sed li devis konfesi al si mem, ke ne multe li komprenis. Samtempe li rememoris la celon de sia veno en la templon kaj subite demandis la grandan kuraciston:

—Vi devis, sanktaj patroj, montri al mi la sekreton de la faraona trezorejo. Ĉu ĝi estas tio, kion mi vidis?

—Tute ne—, respondis la kuracisto.— Ni estas ignorantoj en la ŝtataj aferoj. Venos ĉi tien la sankta patro Pentuer, granda saĝulo; li forprenos la vualon de viaj okuloj. Ramzes adiaŭis la kuraciston, scivole pensante pri tio, kion oni estis montronta al li.

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetotekolanti.com/hale/k80.pdf

## Enhavo


Redaktore.........................2

Parolas la Prezidanto....3

¡Viva la Repűblica!.......4

Vojaĝo interuptita........6

Poema angulo................8

Protektu senkulpulojn...9

La Faraono, ĉ. 26ª.......11


Kovrilo: La dua volumo de La Faraono.

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp kaj Scribus.


Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460